

N. N. 32,  
**Elkreskis  
branĉeto**  
*tradukita de Joachim  
Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
el rozarbust' de Di'.  
Aŭguro de profeto  
rakontis jam pri ĝi.  
Naskiĝis rozfloreto  
meze en vintra nokto  
laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
Jesaj' prognozis ĝin -  
el sia korpo sproson  
Mari' la virgulin'.  
Laŭ dipotanca vol'  
si naskis Di-infano  
por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloredo  
tre hele lumas ĝi.  
Obskuron la brileto  
forprenas nun de ni.  
Vi hom' kaj vera Di'  
el pekoj kaj suferoj  
estas savant' por ni.

...

N. N. 32,  
**roz-** Es ist ein Ros entsprungen  
*tradukita de Leland  
Bryant Ross*

1. Es ist ein Ros entsprungen  
aus einer Wurzel zart,  
wie uns die Alten sungen,  
von Jesse kam die Art  
und hat ein Blümlein bracht  
mitten im kalten Winter,  
wohl zu der halben Nacht.

2. Das Röslein, das ich meine,  
davon Jesaia sagt,  
ist Maria die reine,  
die uns das Blümlein bracht.  
Aus Gottes ewgem Rat  
hat sie ein Kind geboren  
und blieb ein reine Magd.

3. Das Blümelein so kleine,  
das duftet uns so süß,  
mit seinem hellen Scheine  
vertreibt's die Finsternis:  
Wahr' Mensch und wahrer Gott,  
hilft uns aus allem Leide,  
rettet von Sünd und Tod.

...

N. N. 32,  
**Jen ĉiamviva Ro-  
ZO**  
*tradukita de Leland  
Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
laŭ vorto de profet'  
El la Jišaja ŝoso  
ekkreskis kun impet'.  
Ĝi venis, hela Flor',  
en frida tempo vintra  
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
la mencita Flor';  
Maria ĝin responsis  
el patrin-ama kor'.  
Si naskis Rozon por  
klarigi Dian amon  
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
per sia dolĉ-arom'  
Heligas per Digloro  
la vojon de la hom'.  
Ja homo, tamen Di',  
ĝi ŝarĝojn malpezigas  
Kaj homojn savas ĝi.

...

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.*

*Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)*

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Es\\_ist\\_ein\\_Ros\\_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingebo.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.*

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).*

*Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.*